

Tagiĝo

N-ro 38	Cirkulero de Esperanto-Junularo ĉe Kulturdomo de Petr Bezruč en Opava. Redaktas: Ing. Jan Werner, OSTRAVA-Kunčice, Na Lachu 6, Ĉeĥoslovakio	Marto 1958
------------	---	---------------

Antaŭ ekmarŝo.

El pluraj lokoj venas esperigaj informoj pri aktiveco de ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Nombro de la kursoj estas pli alta ol en la jaroj pasintaj. Dezirinde estas, ke ankaŭ la kvalito kaj nombro de Esperanto-instruistoj kresku. Por nunjara somero estas preparata aro da kolegioj kaj tendaroj, kiuj certe multe kontribuos al forigo de tiu ĉi manko.

Je viaj senpaciencaj demandoj pri la organiza strukturo de nia movado enlanda mi ankoraŭ ne respondas, sed via atendado povas jam esti kalkulata nur je tagoj. Niaj esperoj plurflanke plenumiĝos, sed niaj taskoj estos des pli grandaj kaj plu ili restos kuŝantaj precipe je niaj grupoj ĉe lokaj kultur-organizaĵoj.

Mi apelacias en senco de nia perspektiva plano je niaj grupoj, ke ili rompu sian izolon kaj organizu la agadon en kunlaboro kun ĉiuj niaj aktivuloj en sia regiono. Proponu vian servon al la pacdefendantoj, kontaktu kun MEM. Instruu en organizaĵoj de "Pionýr", ĈSM kaj en lernejoj. Agu tiukampe almenaŭ kiel samideanoj en regiono Ostrava, kie Esperanto estas instruata en 8 lernejoj. Sukcesi en lernejoj estas nia junulara programo, starigita aŭtune 1957 en Ostrava. Ne forgesu pri ĉiu via ago informi la redakcion kaj pri la lernejoj s-anon O. Schwetter en Havířov.

Jan Werner

Al mortinta poeto

La 17 Februaro 1958 je la 3-a horo matene mortis ĉeĥa nacia artisto, poeto Petr Bezruč (propranome Vladimír Vašek).

Al ĉiu, kiu aŭdis tiun ĉi tristan sciigon, premiĝis la koro. Foriris homo, kiun ni ĉiuj amis, maljunuleto, al kiu aŭtune, okaze de lia 90-jara naskiĝjubileo, ni sincere deziris ankoraŭ multajn jarojn de kontenta plenaĝo.

Finiĝis longa vivo de Vladimír Vašek. Li naskiĝis en Opava la 17 Septembro 1867 kiel filo de ĉeĥa profesoro kaj silezia nacia reviviganto Antonín Vašek. En 1a jaro 1873 la tuta familio de prof. Vašek venis al Brno, kie Vladimír en la jaro 1885 finis la gimnazian studadon. Tri jarojn li poste studis la klasikan filologion en Praha, sed tiun li ĉesigis kaj foriris en praktikan vivon kiel poŝta oficisto. En la jaro 1891 laŭ lia propra peto li estas sendita deĵore al Místek. Li revenas al la naskiĝdevena Silezio, en regionon, kies popolo tiom suferis pro senkompata sociala kaj nacia subpremo de germanaj kaj judaj suverenoj. Vašek intensive sentas doloron de la subpremata ĉeĥa branĉo, kiu vane vokas pri helpo al malproksima Praha. Li vidas kiel malrapide, sed konstante, estingiĝas la ĉeĥa vivo sub Lysá kaj antaŭ Těšín, apud Hlučín kaj ankaŭ trans Opava.

Ankaŭ post reveno al Brno turmentas lin timo, pri estonto de la popolo, kiun li eliris, korpreno, kiu gradiĝas en lia malsano. Kio okazos, se mi mortos kaj se neniuj eldiros tiun nepardoneman veron?

El la situacio fontas inspiroj por "Sileziaj Poemoj", kiuj eksonis kiel alarma sireno en oreloj de tiuj, kiuj en Bohemio trankvile kaj senriproĉe forgesadis je Silezio. Baldaŭ post publikigo en "Čas" (unuopaj poemoj kde februaro 1899) ili aperas en kolekto kiel "Silezia numero" (1903), kaj kiel "Sileziaj Poemoj" (1909).

Komenciĝas serĉado de la aŭtoro, kiu sin kaŝis post la pseŭdonimo Petr Bezruč. Vladimír Vašek estas longe nesuspektata de literaturaj kritikistoj kaj ankaŭ de aŭstriaj registaraj regantoj, al kiuj ribelaj strofoj estis pike ekscitaj. En la jaro 1927 li restas en Brno, poste en Branka, Ostravice kaj en Kostelec na Hané. Eĉ kiam li ne sukcesis resti inkognito, li gardas ĵaluze sian trankvilon kaj solecon, rampas 'en sian groteton kiel "naljuna saŭrio", kiel li mem sin nomas. Sed liaj "Sileziaj Poemoj" vivas inter la popolo. De post la jaro 1909 ili aperas ofte kaj en multmilaj eldonkvantoj, ankaŭ tradukitaj en multajn fremdajn lingvojn. La versoj, simplaj kaj koncizaj, sonas en nia memoro ekde l' junaĝo kaj akompanas nin ĉie. La poemoj de Petr Bezruč ne malnoviĝis, ili restas freŝaj, ĉar ili elkreskis rekte el koroj de la suferanta popolo.

La 17 Februaro mortis Vladimír Vašek. Sed la poeto Petr Bezruč vivas kaj instruas nin vivi kaj batali necedeme por vero kaj justeco. Sileziaj poemoj - ruĝa floro, kiu nnr unufoje disfloris el angoro kaj soleco de l' poeta koro, kiu alprenis la sorton de sia gento - tiuj ĉiam restos kun ni, eĉ se ilia kreinto trankvile jam ripozas en la naska tero, en tombejo de Opava. Vl.K.

Petr BEZRUCĤ:

Kiu anstataŭos min

Ne multa mia sango, kaj tiu eĉ fluas
el mia buŝ'.

Dum herbo-pluŝ'
min kovros, dum mi putros jam,
kiu min anstataŭos,
kaj ŝildon levos - kies man'?

Mi staris en ferfabrika forno-fum'
kun arda mieno, okulo en mallum';
brilegu la suno aŭ estu vespere,
mi tiujn murdistojn rigardis kolere
- jen grafon nobelan, jen judon mon-tintan -
mi aĉa ministro, el ŝakto saltinta.
Eĉ se diademon sur kapo li havis,
lin mia rigardo fiksita altrafis,
la mano pugnita, obstin'
de homo beskida, el min'.

Ne multa mia sango, kaj tiu eĉ fluas
el mia buŝ'.

Dum herbopluŝ'
min kovros, dum mi putros jam,
kiu la gardon prenos,
la ŝildon levos - kies man'?

SOMERAJ KURSOJ DE ESPERANTO EN PŘÍBOR

okazos inter la 13-a kaj 27-a de julio 1958. Bela ĉirkaŭaĵo, ekskursoj. Loĝado laŭ elekto (hotelo, privatejo, turisma tranoktejo).

KURSOJ: elementa, daŭriga, por kursgvidantoj.

INFORMOJ: s-ano Ant. Satték, PŘÍBOR, Dvořákova 744.

VI.S.

FEBRUARA VIZITO EN BRNO

La tradicia esperantista maskobalo kaj junulara labor-konferenco, okazintaj la 15.– 16. 2. en kadro de Esperanto–Seminario, venigis al Brno gesamideanojn el ĉiuj regionoj de Moravio kaj el pluraj regionoj bohemiaj kaj el Slovakio.

La konferencanoj kunsidis dimanĉe antaŭtagmeze en Spegula salono de hotelo Slovan. Programon gvidis la prezidanto de E-Junularo en Brno, s-ano Andreo Valjan, kiu en komenco tralegis la leteron de s-ano Jaroslav Mařík el Praha pri aktualaĵoj en la movado.

Poste la redaktoro de "Tagiĝo" menciis kelkvorte la situacion kaj taskon de tiu ĉi cirkulero. Dum la unuaj du semajnoj de februaro venis 200 abonpagoj (nun la nombro proksimiĝas al 400; la januara n-ro elĉerpita). La abonagitado ni devas daŭrigi ĝis la planita nombro 500.

Plej diskutataj estis stud-tendaroj kaj precipe la problemo de A-kursoj. Espereble post respekto de la bonaj vidpunktoj ni kontentigos ĉiujn.

La plej grava rezulto de la kunsido estas elekto de centra preparkomitato por SET-1958, kiu ankoraŭ samtage unuafoje kunvenis por pritrakti la plej urĝajn aferojn. Kiel ĝia prezidanto estis elektita s-ano Jan Werner, redaktoro de "Tagiĝo". Pluaj komitatanoj:

Sekretario: Vlastimil Kočvara, OSTRAVA VIII, Kamenec 251/

Zorganto pri instruado: Vlastimil Novobilský, PRAHA II, Grégrova 22.

Zorgantoj pri teknikaj aferoj:

Josef Solnický, OPAVA, Holasická 53.

Karel Kraft, OBOŘIŠTĚ 100, okr. Dobříš.

Pavel Sittauer, TŘEBÍČ, Riegrova 62.

Zorgantoj pri programo kromkurso:

Andreo Valjan, BRNO 16, Jana Babáka 3-5.

Oldřich Schwetter, HAVIŘOV I, Blok 14/67.

Ján Slivka, BRATISLAVA, Suvorovova 16a/321.

Brno nin akceptis tre sincere. Kunestis ankaŭ samideanoj J. Vondroušek kaj J. Kořínek, kiuj tre simpatias kun la junularo. Venontan februaron ni certe revizitos Brnon.

J.W.

REGIONA LABORKUNVENO EN KOŠICE

Samtempe kun la aranĝoj en Brno kunvenis slovakoj en Košice. La 15.2. estis en programo interkonatiĝa vespero en Hungara restoracio de Levoča-Domo. La 16.2. en Marmora salono de SČSP kunvenis 45 gesamideanoj kaj okupis sin pri esperantista agado en Slovakio.

La aranĝoj estis organizitaj de Esperantista Rondeto ĉe KDO kaj de regiona Domo de Klerigo en Košice.

Pri rezultoj de la traktado temas la sekvanta raporto:

STUD-TENDAROJ en SLOVAKIO 1958

Laŭ cirkulero de s. Milan Zvara (de 18/II), en la regiona esperantista konferenco, okazinta 16.II. en Košice, estis proponite aranĝi en Slovakio du somerajn kursarojn en la jaro 1958.

La unuan aranĝus, por kursanoj de iu ajn aĝo, la Regiona Esperantista Komitato (Košice) en la turista kabano Otilia apud Košice, kie estas loko por 60 personoj, de la 13-a ĝis 27-a de julio. Manĝo kaj loĝo kostas potage Kčs 30,00.

Samideanoj el Prakovce proponis pere de St. Horák aranĝi ankaŭ kursaron en kabanoj apud la Lago de Paco, proksime de la vilaĝo Uhorná, distrikto Gelnica, kun eventualaj ekskursoj al Bačanský vrch kaj Krásna Hôrka. La lago donas eblecon bani sin kaj boati. Manĝokosto potage Kčs 24,00 - loĝkosto ankoraŭ nefiksita. Tiu ĉi kursaro estus aranĝebla kiel junulara.

Post la ricevo de opinioj de demanditaj personoj s-ano M. Zvara (adr.: KOSMOB Bardejov) anoncos la rezulton kaj la formon de la aranĝoj. -jm-

El la vivo de junularaj grupoj.

OSTROV u Karlových Var. Fondita nova esperantista rondeto ĉe la kulturdomo. Skribis al ni: Ing. Alex Czapek, Sídlíště 842/20, Ostrov u Karlových Var.

TÁBOR. La kurso por komencantoj jam finiĝis. La kursanoj daŭrigas la studadon en rondeto por progresintoj. Dank' al Dro Rajlich oni disaŭdigis mallongan interparolon kun Inĝ. Krajčic en loka radio (rozhlas po drátě). Ni volas aliĝi al kurso por urbo-gvidantoj en nomo de esperantistaj interpretistoj. Dro Jokl tradukis gvidlibreton pri Tábor en Esperanton. Ni multobligos ĝin kaj liveros al la urbo-servo por propagando. L.K.

STRAKONICE. Ĉiuj membroj de la rondeto diligente lernas, tradukas kaj preparas bonajn programojn. Ankaŭ estis projekciita filmo pri sakfajfistoj. V.T.

HRADEC KRÁLOVÉ. La 27.3.1958 finiĝos per letervespero kaj solenaĵo la kurso gvidata de s-anino L. Rejthárková. Vizitas ĝin 23 17-30-jaraj gesamideanoj.

EK en Hradec Králové festos en aprilo 1958 sian 50-jaran jubileon. Dank' al hazardo oni trovis en Praha ĝian fondinton kaj la unuan prezidanton, s-anon Rudolf Faulkner, kiun oni invitos al solena regiona kunveno. Kiel li skribis, li ne ĉesis esti samideano, kvankam anstataŭ al Esperanto li nun dediĉas sin al fiziko. L.R.

Okaze de la ora jubileo de Esperantista Klubo en Hradec Králové la redakcio de "Tagiĝo" esprimas sian koran gratulon.

BRNO. Antaŭ maskobalo kaj konferenco, pri kiu ni raportas aparte, la Junularo aranĝis E-Seminarion. Prelegis J. Vondroušek, M. Lorková, J. Kořínek kaj Ján Slivka el Bratislava.

HAVÍŘOV. La kunvenoj okazas nun konstante en la Distrikta Kulturdomo ĉiuŝaŭde je la 20-a horo.

La 23-an de marto okazos en Havířov regiona esperantista kunveno.

DOLNÍ BLUDOVICE. Distrikta pedagogia centro en Ĉes. Těšín petis nian lernejan rondeton, ke ĝi sendu pac-leterojn en kapitalistajn landojn. Ni jam sendis 16 leterojn en 10 landojn. Poste venis dua letero de la Distrikta ped. centro en Český Těšín kaj tie ili interalie skribis:

...post la interkonsento kun gekamaradoj inspektoroj ni - petas vin, ke vi preparu por nia ped. centro prelegon "Helpe de esperantista rondeto en pacbatalo". Vi prelegos en la kadro de solenaĵoj dediĉitaj honore al J.A.Komenský en monato marto. La daŭro de la prelego kun diskuto estu maksimume 2,5 horoj." - Tiu ĉi prelego estos deviga por delegotaj instruistoj el la tuta distrikto, el ĉiuj lernejoj. Mi ne dubas, ke venos ankaŭ la aliaj, ĉar la ekspozicio en la loka muzeo en Ĉ. Těšín bone impresis. La gazeto "Zprávy okresního muzea v Č.Těšíně" enhavis en la januara numero ankaŭ raporteton pri la ekspozicio de nia lerneja rondeto. O.S.

OPAVA. En la lastaj tagoj de januaro la stacio de Ostrava- televido elsendis interjuon kun s. Frantl pri lia meritplena laboro por paco helpe de Esperanto (vidu la januaran n-ron!). Nun estas preparata plua televida programo kun s. Frantl el Opava.

OSTRAVA-JUNULARO (VŽKG). La 26.2. estis malfermita plua elementa kurso, kiu daŭros 4 monatojn.

La monatprogramoj en la dua kvaronjaro 1958, ĉiam je la 19,30 en "Zámek" en Ostrava-Vítkovice:

23.4. - "Pola Vespero".

21.5. - "Majo en prozo kaj poezio".

18.6. - "Gaje kaj serioze" (kabareto).

Membro de la junulara grupo Dro Inĝ.B.Švidrnok instruas Esperanton en industria lernejo. La kurson vizitas 20 lernantoj.

OSTRAVA - mezo. En 11-jara lernejo estis malfermita kurso de Esperanto por 15 partoprenantoj. Instruas s-ano Vl. Slaný.

OSTRAVA-Michálkovice. La 16.1.1958 fondita helpe de la Tramista E-klubo kaj de E-Junularo Ostrava nova esperantista grupo ĉe uzina klubo de la minejo Petr Cinger. Estis elektita 5-membra komitato kaj malfermita elementa kurso por 19 partoprenantoj.

OSTRAVA-Přívoz. S-ano Lubomír Musálek gvidas kurson por 18 komencantoj en fervojaj laborejoj ČSD.

PORUBA ĉe Ostrava. La 11.2, komenciĝis kurso por 12 komencantoj kaj progresintoj. Instruas s-ano Vl. Slaný kaj Lad. Adámek.

KOŠICE. S-ano Ant. Zachariáš frekventint de SET en Popelná, gvidas elementan kurson de Esp. en la industria lernejo.- Ni ĝojas, ke nia juna samideano, kiu entuziasmiĝis en Popelná, plenumas sian promeson reaktivigi la movadon en Košice.

SLOVAKIO entute. Ĉiuj esperantistoj en Slovakio atendas la tagon, kiam ekfunkcios la Ĉeĥoslovaka ESPERANTO-Komitato. Tio forigos la malhelpon en fondado de grupoj en la Kultur-Domoj. En Slovakio ekzistas nun grupetoj en: Košice, Bardejov, Prakovce, Levoča, Spiš. N.Ves, Poprad, Svit.Mikuláš,Žilina,Martin,Púčov,Trenčín, Bratislava Nové Zámky. Malfacile diri, kiu el ili estas junulara aŭ ne. Pure junularaj rondetoj ŝajne ne ekzistas plu ĉe ni. Fine ni mem jam devos zorgi, ke post ni sekvu vera junularo, kiu bedaŭrinde mankas.

M. Zvara

Argumentado per "Bloknot agitatora".

La Esperanto-Rondo en Pardubice eldonis per multobligo (tre bone legebla!) ĉeĥan tradukon de la artikolo de N. Andrejev "Esperanto - la internacia lingvo de paco kaj amikeco", kiu aperis en ruslingva originalo, en "Bloknot agitatora", organo de la leningrada regiona kaj urba komitatoj de la Komunista Partio Sovetunia. Tiu ĉi favora artikolo en oficiala partia gazeto sovetunia povas servi ankaŭ ĉe ni kiel argumento dum traktado kun instancoj. - Unu tripaĝa ekzemplero kun foto de la rusa originalo estas ricevebla po 1 Kčs ĉe: Jar. Štechr, Dukla 2275, Pardubice. /jm/

Turisman prospekton pri Ĉeĥoslovakio

en Esperanto eldonis ĉeĥoslovaka turisma oficejo ČEDOK. Eksterlandanoj petu ĝin de: ČEDOK, Praha 3, Na Příkopě 18.

Manifesto de la paco, en kiu esprimis sian strebadon la reprezentantoj de komunistaj kaj laboristaj partioj el 64 diversaj landoj, kunvenintaj en Moskvo por festi la 40-jaran jubileon de "Granda oktobra socialista revolucio", estis fototipie eldonita en Esperanta traduko kaj dissendita fare de Esperantista rondeto ĉe uzina klubo de "Přerovské strojírny" en Přerov.

La jugoslaviana "Suda Stelo", transformita en literaturan gazeton, planas eldoni specialan ĉeĥoslovakian numeron literaturan. Nia junulara kultur-delegito Vl. Novobilský estis petita pri kunlaboro.

"Mladá fronta" (Juna fronto) - ĵurnalo de Ĉeĥoslovaka Asocio Junulara publikigis dimanĉe la 16.II.1958 artikolon titolitan "Kio estas kaj kio ne estas Esperanto". Aŭtoro en ĝi respondas al pluraj demandintaj legantoj pri Esperanto. Li traktas ĝin objektive, t.s. nek refute nek rekomendante. Malgraŭ la informa, seka tono, kiu al esperantisto arde agitanta por nia movado ŝajnas esti negativa, ni povas esperi, ke pluraj junaj homoj tuŝitaj per la problemoj, serĉos lernolibron de Esperanto. J.W.

"JISKRA" — gazeto de VŽKG en Ostrava publikigis la 8 Januaro 1958 artikolon de s-ano Zdeněk Samek "Japana kuracisto skribas...". La artikolo pri kontraŭatombomba kampanjo enhavas ĉeĥan tradukon de la letero skribita de Dro Nabuo Kusano, kiu donis la unuan helpon al vunditoj en Hiroŝima tuj post la atombomba eksplodo.

Vizito el GDR.

En la lastaj tagoj de 1957 kelkaj samideanoj en Praha havis la okazon ĝui kelkhoran kuneston de juna samideano el GDR, Hieronymus Stroinski el Leipzig, kiu venis kun turista karavano. Kvankan 23-jara, li parolis tute flue, laŭ naniero de rutina esperantisto. La konversacio estis tre vigla. Ni ĝojis, ke ankaŭ en Germana Demokrata Respubliko povas elkreski junaj samideanoj de tia perfekteco kaj informiteco. /jm/.

Junulara grupo "FAJRERO", en Moskvo.

Esperantista Klubo en Poděbrady ricevis leteron de s-ano Mikael Giŝpling, kiu priskribas novan restaŭradon de l' movado en Moskvo kaj invitas nin al koresponda kontakto. El la letero ni citas:

...Malgraŭ diversaj obstakloj kaj malfavoraj rilatoj de apartaj "potenculoj", post la Festivalo ni antaŭ nelonge organizis en Moskva tiel nomitan "Moskvan Esperantistan Junularan Grupon FAJRERO". Ĝi estas la unua postmilita esperantista grupo en nia urbo. Jen estas ĝia adreso:

Junulara Esperantista grupo FAJRERO
poŝtkesto 1253 — Moskva K — 9, USSR.

Al la amika grupo ni deziras bonajn rezultojn en la agado kaj niajn grupojn ni instigas al kunlaboro kun la soveta junularo.

Hungario.

Laŭ informo de s. Dro I. Ferenczy, estro de Junulara Fakoj de HEK, oni serioze preparas Someran Esp. Tendaron en Esstergom (vidu informon en la pasinta Tagiĝo). Dro Ferenczy, partopreninto de nia SET 1956 en Žimrovice, verŝajne estos tendarestro. Krom aliaj prelegos tie ankaŭ J.Baghy kaj K.Kalocsay.

HEK sendos oficialan delegacion al Universala Kongreso en Mains kaj reprezentanton al bulgara esp. kongreso. La sindikata tagĵurnalo Népsava raportis 7/2 pri la laboro de HEK — Junulara Fakoj kaj pri prelege de s. Ferenczy en Parádfurd pri la moskva festivalo. /jm/.

14.-a INTERNACIA JUNULAR — KUNVENO.

De la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1958 en Homburg (Saar/Germanujo) okazos la 14-a Internacia Junular-Kunveno de TEJO.

Provizora programo: Interamikiĝa vespero, diservoj en Esperanto, solena inaŭguro, kongresa balo, tuttaga aŭtobusekskurso tra Sarlando, laborkunsido de TEJO, kulturaj prelegoj, filmprezentaĵoj, oratora kaj sportaj konkursoj, folkloraj kaj gajaj vesperoj, solena fermo kaj forveturo de karavano al la 43-a Universala Kongreso en Majenco. Ĉiuj partoprenantoj rajtas eniri senpage la subĉielan naĝejon. Gaz/B/jam.

INTERNACIA SEMINARIO DE GERMARA ESPERANTO-JUNULARO.

En la komforta kaj moderna junulargastejo de Majenco disvolviĝis, de la 26-a de decembro 1957-a ĝis la 1-a de januaro 1958-a, la Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, kiun partoprenis 43 gesamideanoj, grandparte gejunuloj, el 7 landoj.

La solena malfermo okazis en ĉeesto de la Ĉefurbestro de Majenco, s-ro Stein, kiu prelegis pri la kunlaboro de la Eŭropaj komunumoj.

S.O.S. - INFAN-VILAĜO.

Verŝajne vi aŭdis aŭ legis pri la infan-vilaĝo. Se ne, jen kelkaj koncizaj vortoj pri Infan-vilaĝo.

Kiam la infanoj fariĝas orfoj, plej ofte iu parenco zorgas pri ili, sed okazas ankaŭ, ke ili restas tute solaj. En tiu okazo la diversaj filantropiaj asocioj akceptas ilin, sed la familia atmosfero mankas kaj ili kreskas sen amanta patrino. Kelkaj feliĉuletoj trovas adoptajn gepatrojn, sed multaj restas neadoptitaj, ĉar oni pli volonte adoptas bebon ol jam pli aĝan infanon.

La franca ŝtato sekvis la ideon pri la infan-vilaĝoj, kiu naskiĝis en Aŭstrujo, Svisujo kaj Anglujo. La S.O.S. kreiĝis en Francujo pere de d-ro Gilbert Cotteau. Li kreis vilaĝon kun ĉarmaj dometoj. Ĉiu hejmo ricevas 8 neadoptitajn infanojn kaj unu elektita virino fariĝas dum sia tuta vivo patrino de ĉi tiu nova familio.

Ni rimarkis, ke mankas la Esperanto-nejmo kaj mi ricevis la rajton helpi la konstruon de ĉi tiu domo. Mi jam kelkfoje parolis pri nia domo eksterlande, la unuan fojon en Krommenie dum la Internacia Esp. Ferio-Semajno kaj la kolekto donis proksimume 20 ned. guldenojn.

Se ĉiuj Esperantistoj tra la tuta mondo volus helpi nin, rapide la Esperanto-nejmo estus efektiga. Mi estos tre dankema se ankaŭ vi helpos nin per kelkaj moneroj aŭ pli bone se vi fariĝos aktiva membro. La kotizo estas de 2 ned. guldenoj poĵare. (Ni el Ĉeĥoslovakio ne povas sendi ronon, sed ni kredas, ke utilos ankaŭ p.m., unuataĝaj kovertoj k.s.)

En la nomo de niaj 8 estontaj esperantistaj orfoj de la S.O.S, Esperanto-nejmo dankas:
E. Hanicot, 2 Rue Flahaut, Boulogne sur Mer, P. deC. Francujo.

Juro Mevo: Mistero de Astron.

Raketaviadilo fluganta de sur la planedo Astron proksimiĝas per kaptuna rapideco al la tera surfaco. Oni povas jam evidente distingi la marojn kaj kontinentojn, eĉ montarojn, laŭ instrukcioj de interplaneda esplora stabo en la ŝtato Ishi devas esti en la plej proksimaj sekundoj funkciigita raketa brems-aparato, aŭ minacos frakasiĝo de la aviadilo sur la tereno de Tero.

Merano kuŝanta ĉe la direktila tabulo agas, sed liaj manoj febre tremetas de ekscitiĝo, kiun li ne volas montri al la ceteraj du pasaĝeroj, al Rumeno kaj fraŭlino Seden. La raketbremso spitas... ankoraŭ 30 sekundoj... montrilo de reakcia premo senmovas, vane Merano ree kaj ree provas fruntan turbinon funkciigi... Ankoraŭ 15 sekundoj da vivo. Merano vokas: "La brems resistas! Ni mortos! Mortos! Ni... la unuaj astronanoj sur Tero!... Amikoj, ankoraŭ 9 sekundoj, nur ok, sep... Kiel longaj estas la sekundoj, ĉiu kvazaŭ eterneco alblovos min. Tri, la Tero estas...

Puŝiĝis du misteroj. Mistero de Tero kaj mistero de Astron. Tiu fama loko estas proksime de unu ĉeĥa vilaĝo. Pro kiu kaŭzo ĝi ne venis en ĝeneralan konatecon ne estas klare. Nur unu homo scias pri ĉio, kio tie foje okazis.

La ununura sciinto estas klera viro, kiu nun loĝas en Praha. Ĉeĥa sciencisto, univ. prof. Dro Jaroslav Stuchlík devas lin vole nevole konsideri kiel sian plej interesan kaj plej genian pacienton. Li konas ĉefajn eŭropajn lingvojn, la japanan kaj pasive li konas plurajn lingvojn de Oriento.

Sed tio ne satigis lian emon al lingvoj. Li men elpensis 16 novajn lingvojn kun specialaj alfabetoj. Ties gramatikoj estas perfekte prilaboritaj kaj kejkaj el la vortaroj enhavas ĉirkaŭ 10.000 vortojn. En lingvon "ishi" li ekzemple tradukis unu tutan evangelion kaj verkis romanojn. Pluaj lingvoj estas la stehuta, kimbela, vulfrana k.a.

Por doni al siaj artefaritaj lingvoj ian bazon de realo, li elpensis interalie ankaŭ la planedon Thesis aŭ Astron, unu el asteroidoj kaj la katastrofon de la astron raketaviadilo. El la trimembra grupo restis viva nur Dahorjáné Sedano, filino de universitata prof. en Astron. Nia vira lernigis al ŝi la ĉeĥan lingvon kaj edziĝis al ŝi. Kompreneble li ĉerpis de ŝi ĉiujn informojn pri Astron kaj astronaj lingvoj.

Laŭ aserto de niaj lingvaj fakuloj liaj lingvaj projektoj estas logikaj kaj uzeblaj.

Februare 1958 ĵurnalo "Svobodné slovo" anoncas, ke li prilaboris ankaŭ tutan historion pri unuopaj elpensitaj nacioj kaj respublikoj sur Astron, ekzemple pri Hesperio, ke li verkis ampleksajn traktaĵojn pri lingvoj de Astron. Li eĉ okupis sin pri pluraj detaloj, ekzemple li kompilis horplanon

de hesperaj fervoj, desegnis poŝtmarkojn, bankbiletojn kaj fervojbiletojn.

Tiu ĉi unika fenomeno unuafoje priskribita de Dro Stuchlík vekis eksterordinaran intereson en psikiatriaĵoj de la tuta mondo. Ĝi ne havas analogion en paseo nek en nuntempo.

Dro Stuchlík nun preparas ampleksan verkon, en kiu estos ankaŭ tiu ĉi afero science pritraktita. Metodojn de kreado de artefaritaj lingvoj li dividas en tri kategoriojn. En la unuan li vicigas aŭtoroj de lingvoj internaciaj, el kiuj kelkaj laŭdire vastiĝis sukcese (li mencias Esperanton, idon, interlinguam). Al la dua kategorio apartenas homoj, kiuj kreas lingvon pro siaj misaj spiritaj procesoj kaj konceptoj. Al tiu ĉi grupo apartenas ankaŭ la priskribita fenomeno.

Nur bagatelaĵon.

Mi kverelis kun mia estro. Pro iu bagatelaĵo. Li tre kriis. Mi poste ankaŭ kriis. Mi estis konvinkita, ke mi pravas kaj... mi venkis. Tamen malagrabaĵo. Sed mia korĉagreno estis forblovita kiam...

Hejmen mi veturis per tramo. La tramo estis tute normala, ĉar ĝi estis plenŝtopita. Mi nur malfacile eniris ĝin. Tio denove malutilis al mia humoro. Mi jam estis venenita ĝis la lasta sangoguto. Ĉagrene mi ĉirkaŭrigardis. Miajn oknlojn ravis beleta nigroharulino, parte staranta parte pendanta je sia svelta maneto de sur la tenilo. Ŝiaj malhelaj okuloj ridis. Ŝi kaptis mian fiksitan rigardon kaj subite ŝi ekridetis ankaŭ per sia buŝeto. Tiel bonkora, tiel varma rideto ĝi estis. Same mi ekridis kaj denove mi ĝojis el la vivo.

Mi ekmeditis: Kiom bezonas la homo por esti feliĉa? Nur bagatelaĵon.

VI. Novotný

Rendevuo

Sub verda ombroplena baldakeno,
promene iras mi kaj vi,
sur stelornama fono en etero
la Luno palas pro envi'!

Okuloj viaj brile diamantas
dum lipojn koralajn kisas mi.
Plej loge via dolĉa voĉo kantas
dum amon fidelan ĵuras mi.

Mateno aman poezion rompas
per birda preĝa sinfoni'!
Lastfoje ni la frunton karan kisas
senvorte jen disiĝas ni...

- V a n -

La konkurso de Tagiĝo

Sur la redakcia tablo kuŝas 28 leteroj kun plenumitaj taskoj el la pasinta numero. Plejparte ili reprezentas bonajn lingvajn sciojn. Kelkaj ripetigantaj eraroj estas pritraktitaj en la "Lingva anguleto". En poenta klasifikado estas eble gajni por unu tasko 10 poentojn. El ĉiu kategorio ni nomas nur la tri unuajn:

La kategorio B – 1-a tasko:

1. Jiřina Kohoušková (Opava - 9 p.)
2. MUDr Emil Vanĉata (Plasy - 9 p.)
3. Aniĉka Poláková (Lanškroun - 8,5 p.)

La 2-an taskon el la kategorio B sendis neni.

La kategorioj C, D – 1-a tasko:

1. Marie Bohunová (Nová Paka - 9,5 p.)
2. Oldřich Schwetter (Havířov - 9,5 p.)
3. Lecian (sen pluaj indikoj - 9 p.)

2-a tasko:

1. Vladimír Novotný (Praha - 9 p.)
2. Marie Bohunová (Nová Paka - 8,5 p.)
3. Andreo Valjan (Brno - 8 p.)

La modelaj tradukoj de la 1-a konkursa tasko estas faritaj per bazo de la senditaj tradukoj en kunlaboro kun la redakcia rondo. Aparte ni dankas al s-ano Jiří Kořínek el Brno por lia grava helpo.

TASKO 1-a - kategorio B:

(Fragmento el "Fabelo pri fabeloj," de K. Schulz.)

Tiu ĉi nikso estis nek maljuna, nek juna. Li loĝis en profundejo (-aĵo) sub suna (sunplena) deklivo proksime de (al) muelejo kaj eĉ mem ne sciis, kiam li ĉi tie ekloĝis (enloĝiĝis). Al li plaĉis ĉi tie tiom, ke li ne estus ŝanĝinta eĉ por mil potoj kun animoj (-etoj)... Laŭ la profundejo kondukis vojeto (piedvojeteto), sur (laŭ) kiu iradis homoj en la muelejon aŭ ankoraŭ pli malproksimen (foren) ĝis urbo al foiro, kaj tuj sub la deklivo estis larĝa zono (strio) da delikata (fajna) sablo, kie sunumis sin kaj baniĝis (sunumis kaj banis sin) buboj el la vilaĝo. En la muelejo kaj en la vilaĝo oni sciis, ke oni havas ĉi tie nikson, sed neni tro timis lin, ĉar li pro malica volo al neni misfaris (neniun mistraktis, al neni malbonagis, neniun ĝenis)...

TASKO 1-a - kategorioj C, D:

(Fragmento el "Vivo sur Mississippi de Mark Twain.)

Kiam iom pasis mia ĉagreneto (mishumoro) pro la aventuro kun la supera junmaristo, mi komencis timeme konatiĝi kun la plej malsupera rangulo sur la ŝipo - kun la nokta gardisto. Komence li malapreze levis la nazon (faltis, sulkigis la nazon; mienis malapreze) super miaj provoj, subite mi ekkuraĝis proponi al li novan gips-pipon kaj tio lin moligis (mildigis, afabligis). Li permesis al mi sidadi kun li ĉe la granda sonorilo sur la supra ferdeko kaj kun la tempo (post ia tempo) li ekbabilis (komencis interparoli) kun mi. Li ne povis sin defendi (gardi) al (kontraŭ) tio, mi glutis tiel sindone (naive, kredeme) liajn vortojn kaj tro malkaŝe vidigis, kiel mi estas honorata (honorigata) per tio, ke li min atentis... Estis por mi kruela bato, kiam mi poste konstatis, ke li estas ordinara, vulgara, malsprita, sentimentala, duone stulteta babilulo, indiĝeno el la dezertejo de Illionio, kiu ankoraŭ nenie estis, kiu glutlegis amason da murdromanoj (sangoplenaj romanoj) kaj alproprigis al si iliajn mirindaĵojn (miragojn), ĝis li fine senorde ilin enplektis (misplektis, implikis) en sian rakontaĉon (babilaĵoa), tiun li poste rakontadis al nematuruloj (senspertuloj, novuloj), kiel estis mi kaj nome tiom longe, ĝis li mem komencis ĝin kredi.

La redakcio en kunlaboro kun s-anino Sonja Zedníková preparis por vi pluajn du taskojn. Ni ne dubas, ke via partopreno estos ankoraŭ pli spontanea. La ellaboritajn taskojn sendu al la redaktoro antaŭ fino de aprilo. Se vi deziras ricevi la 4-an taskon korektitan, almetu 60-heleran poŝtmarkon.



TASKO 3-a: trarigardu zorgeme la supran bildeton kaj skribu. La kategorioj C, D krome ambaŭ obeu vian fantazion.

Kategorio B: Priskribu la bildon. Skribu ĉion, kion vi vidas sur ĝi.

Kategorio C: Verku rakonteton, kies la bildo estus bona ilustraĵo.

Kategorio D: Verku poemon, juĝistan, filozofian aŭ sciencan artikolon, kies la bildo estus ilustraĵo.

TASKO 4-a: traduku:

Kategorio B: 1. Jak jsi stár? 2. Je mi dvacet let. 3. Kolik je hodin? 4. Jsou právě 3 hodiny a 10 minut. 5. Přijď o půl sedmé! 6. Přišel o půl druhé hodiny později. 7. Kolikátého je dnes? 8. Dnes je 25. března 1958. 9. Koupil mně čtvrt dortu. 10. Vyřešiti všechno naráz.

Kategorioj C, D: 1. Co se toho týče, jsem spokojen. 2. Výjma jeho ať přijdou všichni. 3. Ve srovnávání s tebou neobstojí. 4. Z tohoto důvodu ti nemohu věřit. 5. Vzdor tomu jsi ho Esperanto naučil. 6. Je důležité, abys byl přítomen. 7. Je snadné se o tom zmínit. 8. Prostřednictvím mého bratra to lze uskutečnit. 9. Zásluhou jejich intervence můžeme být klidni. 10. S jeho pomocí uspěji.

NAJADO de A. Dvořák en koncerta aranĝo estas preparata de EK Praha je la 13-a de aprilo 1958. 100-membra ensemblo de orkestro, ĥoro kaj solistoj. Salono por 600 homoj. Pri okazigo zorgas la fama Dro Pravoslav Sádlo-Páv.

Gramatika anguleto

- ...li ne estus ŝanĝinta eĉ por... - erara estas uzo de du negacioj, kaj antaŭ "estus" kaj post la adverbo "eĉ". - "estus ŝanĝinta" estas pli ĝusta ol nura "ŝanĝus", kiu ne indikas absolutan tempon - tempon de kondicionala okazigo.
- ...por (ne pro) mil potoj... - "mil potoj" estas celo ne kaŭzo, do la ĝusta prepozicio estas "por".
- ...vojeto kondukis malproksimen... - (direkta akuzativo).
- ...buboj sunbaniĝis kaj baniĝis... - peko kontraŭ la bona stilo. Ne uzu sinsekve du samajn

vortojn (baniĝi), en tiu ĉi frazo vi povis uzi: ...buboj sunumis kaj banis sin...

- ..."faldi nazon" estas ĉeĥismo facile evitebla per: levi, sulkigi, falti. (falto - vráska).
- ...glutlegi aron da sangromanoj (ne romanojn! - objekta komplemento en prepozitivo - ne rekta objekto).
- ...alproprigi sin iliajn mirojn... estas erara. Ĉe unu verbo ne povas stari du reciproke suborditaj objektoj en la akuzativo. Krom tio: miron (miradon) oni ne povas alproprigi. Ĝusta traduko: ...alproprigi al si iliajn miragojn (mirindaĵojn)...
- ..."kvina trans naŭa" – ĉeĥismo nepre evitinda! Ĝusta traduko: senorde, intermiksite.

LETEROJ DE NIAJ AMIKOJ:

Julio Baghy nin salutas.

La kara paĉjo, amata poeto de niaj Someraj Tendaroj, rememoris nian junalaron okaze de la Nova Jaro. Lia salutkarto, sendita al la estinta junulara sekcio de TKKE, diras:

"Tre kara amiko, saluton al vi kaj al la junularo okaze de la Nova Jaro, kiu alportu por vi kaj por via movado - prosperon, novajn sukcesojn!

Espereble la jaro 1958 alportos pli favorajn cirkonstancojn por tiaj progresemaj klopodoj, kiuj celas la pacon kaj kulturen kunlaboron de la popoloj. Tiel estu!

Kore via
Julio Baghy.

Ni kore reciprokas la salutojn al s-ano Julio Baghy kaj al la hungara movado! /jm/

JULIE ŠUPICHOVÁ: ...tre agrable surprizis min nia nova numero de la Tagiĝo... via laboro por la junularo estas la plej GRAVA...

JAN ZEMEK - samideano, kiu persone kontaktis kaj konis nian Majstron:...Vi ĉiuj miaj junaj geamikoj tion bonege faradas kaj viaj entuziasmo kaj laboro plej efike enfluigos novajn fortojn de juneca fajro al la tuta nia samideanaro!...

JIŘÍ KORÍNEK: Karaj amikoj, mi gratulas vin pro la bela 37-a numero de la TAGIĜO. Jen eta kontribuajo por via plaĉa gazeto:

Kun junaj man-en-mane

Kor' mia batas kun la junaj,
eĉ se la korpon stampis temp',
se post iamaj tagoj sunaj
laŭ vic' nun venas la aŭtunaj,
mi ne forgesas je printemp'!

Kvankam mi devos fari strekon
baldaŭ sub mia vivbilanc',
kaj trenas mian jarkvindekon,
kaj pentas jam kelkiun pekon:
el mia man' ne falis lanc'.

Mi kun vi, junaj, simpatias
kaj volus paŝi al estont',
kor' mia revu kun vi scias,
kaj la okulo ekradias,
dum kun vi staras mi en front'.

Viv,' vi klopodis min disknedi
kaj trafis min eĉ per ponard',
sed mi ne ĉesis je vi kredi:
ja venos junaj plu heredi
fajron de mia fola ard'.

Por la kursestroj

Kiel instrui?

Italaj spertoj pri eduko de esperantistoj.

Laŭ la 34-a n-ro de la italia organo "L' esperanto!" (Torino) ni represas konsilojn de spertaj edukistoj pri metodo de instruado, kiuj estas validaj por ĉiuj landoj.

La V-a nacia kunveno de la italaj Esperanto-grupestroj en Bolonjo multe diskutis pri la manieroj de efika instruado de Esperanto. Prof. GRAZZINI konstatis i.a.:

"La instruado ne povas esti sama al personoj kun elementlerneja klero kaj al personoj kun akademia instruiteco. Estas eraro propagandi Esperanton per rapidkursoj, kiuj ofte seniluziigas la varbitojn.

Prof. PUGNO kontraŭstaris la rektan metodon (Ĉe-metodon kaj opiniis, ke vere racia metodo devus grade trapasi de konkretaj ideoj instruendaj kompare kun nacia lingvo, al abstraktaj kaj al superaj stadioj, en kiuj oni devas uzi ĉiam nur Esperanton parolante al la lernantoj.

M. Stuttgart (Anglujo): "La rezultoj de la rekta Cech-metodo estas tute samaj kiel tiuj de aliaj metodoj; oni tamen devas nepre dividi la lernantojn, ĉar estas iuj eĉ ne konantaj la gramatikon de sia propra lingvo; ĉi tiuj, kiuj tamen povas fariĝi bonegaj esperantistoj, devas havi specialan instruiston kaj precipe specialan lernolibron. Populara lernolibro por tio estas la "Verda koro" de J.Baghy."

G.C.FIGHIERA: "La instruisto tro ofte ne konigas sufiĉe la historion kaj idealojn de la lingvo. Ofte la lernantoj eĉ ne scias kiel uzi Esperanton, kaj la kursoj estas mallongdaŭraj. Eraro estas ankaŭ starigi senpagajn kursojn.

Rektoro CANUTO: "La kandidatoj (por instruista ekzameno) devus sin prezenti ĉe la ekzamenoj kun almenaŭ tri libroj pri la historio de Esperanto kaj du literaturaj verkoj, pri kiuj ili parolu."

M.Stuttgart parolis pri la ideala paŝo, kiu altiras la neesperantistojn al nia movado; ili ne devas esti nutrataj nur per gramatiko, alie ilia flamo estingiĝas. Eĉ Esperanto havas nun sian propran spiriton kaj ne plu eĥas la ĉirkaŭajn literaturojn. Tasko de instruisto estas doni, krom simplan lingvon, idealojn.

La kunveno formulis la diskut-rezultojn en rezolucio:

"La kunveno rimarkas, ke la lingva kaj esperantisma nivelo de niaj instruistoj ne ĉiam estas kontentigaj, kaj emfazas, ke la triagradaj ekzamenoj (t.e. instruistaj) devas esti rigoraj, tiel ke la instruistaj, kiuj estas la kerno de la movado, konsistigu veran eliton.

Oni decidis, ke principe la kursoj ne estu senpagaj kaj ke la kursoj ne estu tro mallongdaŭraj kaj ne limiĝu je nur lingva instruado, sed ampleksu ankaŭ informadon pri la historio, la organizo, la literaturo kaj la celoj de la Internacia Lingvo.

La supraj sugestoj intencas igi la kursojn pli fruktodonaj por akiri el ili pli grandan nombron da aktivaj esperantistoj.

J. M.

Rim.: emfazi - zdůrazniti; rigora - přísný.

ATENTU, D-FREKVENTINTOJ!

Riĉa programo de la ĉi jaraj someraj tendaraj aranĝoj postulas multajn lingvajn kaj programajn gvidantojn. Ges-anoj, kiuj frekventis la D-ekzamenon kaj interesiĝas pri la praktika pedagogio en SET, aliĝu ĝis la 1-a de majo ĉe s.VI. Novobilský, Praha 11, Grégrova 22. Indiku lernoobjekton, kiun vi volus instrui (elementa aŭ daŭriga kurso, konversacio, gramatiko en kursoj C, D, historio kaj literaturo). Prefere estos akceptataj instruistoj de la historio kaj literaturo. Indiku ankaŭ someran lernejon, kiun vi ŝatus ĉeesti. La preparkomitato tamen garantias al si rajton rekomendi al interesulo ĉeeston en iu alia lernejo, se la indikita havas jam necesan nombron de instruistoj. La aliĝoj estos konsiderataj laŭ alven-datoj. La restado por instruistoj estos senpaga.

VI. Novobilský
kultur-delegito

Lekanteto porinfana paĝo de Tagiĝo

Manjo kaj Joĉjo skribas al vi:

Karaj junaj legantoj, ni sukcesis enpenetri en Tagiĝon kun mia propra infana paĝo. Laŭ nia propono oni nomigis ĝin LEKANTETO. Sed ne ĝoju tro frue. La redaktoro diris al mi: "Jes, mi donos paĝon por via Lekanteto, sed la infanoj mem devas montri, ke ili ŝatas legi. Montru, ke vi estas pli pli multaj ol vi du, Manjo kaj Joĉjo.

Do, kion mi faru? Ĉiuj infanoj en Ĉeĥoslovakio, kiuj konas aŭ lernas Esperanton, skribu al la redaktoro de Tagiĝo, ke vi deziras la porinfanan paĝon kaj kion vi ŝatas legi. Sendu ankaŭ kontribuajojn. Faru el LEKANTETO vian LEKANTETON.

Manjo kaj Joĉjo

Pri ŝercemulo Kacafirek

En unu vilaĝo, malproksime de la ĉeĥa limo, vivis pastro, kiu ofte predikis pri malavareco. Li diradis: "Kiam vi ion donas al malriĉuloj, vi ricevos sepoble pli!" En la vilaĝo vivis ankaŭ maljuna homo – Kacafirek, kiu estis ne nur pia, sed ankaŭ tre sprita. Foje dimanĉe, kiam li ree aŭdis prediki pri la malavareco, li ekpensis: "Mi ion faros! Mi dekutimigos la pastron de senĉesa instigado al malavareco." Kiel li diris, li ankaŭ faris. Kiam li venis hejmen, alvokis paŝtiston kaj diris: "Prenu mian plej bonan bovinon kaj alkonduku ĝin al la pastro kaj diru al li, ĝi estas donaco de mi."

La paŝtisto faris laŭ ordono de nia ŝercemulo Kacafirek kaj venontan matenon li pelis sur herbejon krom ĉiuj bovinoj de la pastro ankaŭ la donacitan. La pastro estis feliĉega.

Sed kio okazis, kiam la paŝtisto de pastro vespere pelis la bovinojn hejmen? La bovino donacita de Kacafirek iris hejmen laŭ la malnova vojo kaj ĉiuj bovinoj iris kun ĝi. La paŝtisto rapide kuregis en paroĥejon kaj rakontis al la pastro, kio okazis. La pastro iris tuj al Kacafirek, por ke li redonu la bovinojn, sed Kacafirek respondis, ke li ne donos, ke li ricevis la bovinojn de Dio, kiu lin rekompencis por la bovino donacita al la pastro. Ili disputis tiel longe ĝis fine la pastro iris al ĉefjuĝisto. La ĉefjuĝisto bone konis la ŝercemulon Kacafirek kaj ankaŭ la pastron: Lia verdikto estis: "Kiu scias pli bone mensogi, tiu gajnos, sed la dua ne povas kulpigi la unuan pri mensogo."

La pastro komencis paroli, sed Kacafirek post ĉiu mensogo diris: "Tio estas ebla." Kiam la pastro rakontis jam longe, ekrakontis nia Kacafirek: "Sur mia kampo elkreskis arbo tiom alta, ke ĝis supro estis en la ĉielo. Helpe de la arbo mi grimpis en la ĉielon kaj tie mi vidis grandan pordegon. Mi ekfrapis kaj malfermis al mi belega infaneto, kiu diris al mi, ke mi estis bona kaj pia homo, kaj ke mi povas iri en la ĉielon. Tie estis belege. Mi jam iris longe, kiam mi venis sur verdan herbejon.

Estis tie aro da bovinoj kaj kiel paŝtisto estis tie via patro kaj ...", sed la pastro jam ne eltenis plu aŭskulti kaj ekkriis: "Tio ne estas vero - ". Ho ve, li tute forgesis, ke li devas silenti.

Kacafirek gajnis, sed reveninte li bonvole redonis al la pastro liajn bovinojn. Ekde tiu tempo ili fariĝis bonaj amikoj. Kaj la vilaĝanoj jam ne aŭdis plu la vortojn pri malavareco.

Zdenka Rejlová (Třebíč)
konkursa kontribuajo..

Esperanto malfacila.

Ĉu Esperanto ŝajnas al vi facila? Respondu, kiam vi dekfoje rapide tralegos la sekvantan frazon: "Ne plu ploru plorema plorulo pro la propra plezuro."

DIVENU!

Kiun vorton en Esperanto oni malsame skribas kaj ankaŭ malsame legas? (*malsame*)

ISET 1958

Sekretario: Vl. Kočvara, OSTRAVA VIII, Kamenec 251/3:

Por nunjara somero estas preparataj entute 3 niaj kolegioj, ĉar en du pasintaj jaroj la intereso de junaj homoj tre superis la preparitan kapaciton de ISET.

Akceptataj estos gejunuloj, kiuj atingis 15 jarojn, pli junaj nur kun pli aĝa akompananto. La infana kurso estos por 12-15-jaruloj.

Aliĝoj en A-kursojn estos aprobataj en iom pli malfrua termino, por ke estu garantiita ĉeesto precipe por esperantistoj.

Por ĉiuj tri kolegioj estas fiksita unueca prezo 250 Kčs por dusemajna restado.

Propaganda prospekto kun aliĝilo aperos en aprilo.

JUNULARA ESPERANTO-SEMINARIO en ŽIMROVICE: 6.- 19.7.

La tendaro situos en plaĉa verda valo de la rivero Moravice, oriente de Hradec u Opavy kaj Žimrovice, kie ni jam 4-foje tendumis. La programo konsistos el prelegoj kaj diskutoj pri diversaj temoj destinitaj por funkciuloj de niaj grupoj. Fine de la kurso kunsidos nia ekzamena komisiono, se estos intereso pri la ekzamenoj.

SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO en ŽUPANOVICE: 6.- 19.7.

Por la kolegio estos luita ligna kabano situanta proksimume 150 m de la valdiga lago SLAPY, proksime al la vilaĝo kaj aŭtobusa stacio (komuniko al Praha kaj Dobříš). Kursoj: elementa, daŭriga, konversacia (A,B,C) . Kiu ne kredas pluveltenon de tendo, aliĝu al Županovice!

SOMERA ESPERANTO-TENDARO en LANČOV (2 km) okazos sur herbejo apud Arĝenta golfo de la valdiga lago VRANOV en suda Moravio. Aranĝota vaporŝipa ekskurso al Bítov. La tendaro gastigos 2 etapojn:

20.7.- 2.8. la unua etapo kun la kursoj: B,C,D.


3.- 16.8. la dua etapo kun la kursoj: A;B,C,infana

D-ekzameno. Ĉiu, kiu intencas submeti sin al D-ekzameno, aliĝu ĉe s. Jan Werner (Ostrava-Kunčice, Na Lachu) plej malfrue ĝis fino de junio. De li vi ricevos temon por la diplom-tasko. Samtempe indiku vian profesion, aĝon kaj viajn ŝatatajn kromokupojn! J.W.

Juna Kanto

Vortoj: Vl. Novobilský Muziko: Radim Kudla

1. Serene stelo de la mond'
la nubojn densajn venku jam!
/: Lum' via hela diru al homaro,
ke venkis morton nia juna am'.:/
2. Minacan bruon de milit'
neniam timos nia gent':
/: Hejmos surtere floro de feliĉo,
en koro ĉarmos vera homa sent'.:/
3. De norda neĝo-region'
ĝis varma suda sablo-land',
/: niaj salutoj flugu ventrapide,
tondre nun sonu nia ĝoja kant'.:/




DIVENU

Solvon de krucenigmo el la 37-a n-ro sendis 12 legantoj. La 5 Marto 1958 en la kunveno de E-Junularo Ostrava estis lote elektita s. Marie Bohunová el Nová Paka, al kiu estis sendita libropremio "Sinjoro Tadeo" de Adam Mickiewicz.

La sekvantan krucenigmon sendis al ni s. Vl. Novotný. La solvitan sendu al la redakcio ĝis fino de aprilo. Por ĝusta solvinto estas preparita unu libropremio.

Mallongigoj: r-radiko, rv-renverse, fon-fonetike.



HORIZONTALA:

A/Unua parto de kaŝita devizo /rv/, B/Kunligiĝo por konsistigi unu tuton, persona pronomo en akuz., C/ Negacio, itala konsento, verbo el ringforma insulo. D/ Moviĝi helpe de piedoj, konjunkcio, glata supraĵo /r/. E/ Kulturebla kampo, petola knabeto. F/ Kemia elemento kaj vokalo. G/ Belga kuraĉloko. H/ Adverbo, sovaĝaj porkoj. I/ Senpartia. J/ Aranĝonto de ISET 1958 apud Slapy /sen kapo rv/, nobela titolo /r/. K/ Originala verko de D-ro Lapenna. L/ Afikso, serpento en akuz. /rv/. M/ Tri samaj vokaloj. N/ Legomo /r/. O/ Eŭropano /r/, fama esp. tradukisto kun mallongigo de baptonomo. P/ Longa stango el metalo /r/, interjekcio de stimulo, numeralo. R/ Du konsonantoj,

finajo de prezenco, rabobirdo en akuz. S/ Monda organizo agnoskinta Esperanton, EDND. T/ Tria parto de kaŝita devizo.

VERTIKALE: 1/ Dua parto de la kaŝita devizo. 2/ Forto la la volo /r/, esperantista aŭtoro, senfine. 3/ Dungi /r/, greka diino de pluvarko, elektra unuo de potenco /r/, juvelŝtono /r/, afikso. 4/ Kunsento, protektanta sanktulo, nomo de karto el kartludo. 5/ Havanta guston de citrono /r/, dombesto /r/, angle pordo /rv/, kemmiaj elementoj: nitrogeno, sulfuro, kalio, nitrogeno. 6/ Konsonanto /fon/, rusa rivero, brilema, kemia elemento tulio, nulo kaj tuno. 7/ Parto de kapo /rv/. 8/ Konstrummaterialo /r, rv/, esp. redaktoro, korneca elkreskaĵo ĉe bestoj /r/. 9/ Nigra malmola ligno /r4/, fari objekton el moligita maso helpe de formo. 10/ Enirkarto /r/, ĵeti sin en akvon /r/, 11/ Membrino, kurba fermita linio. - RIM.: 3/7 – v. = u.

PARDONPETO. Bonvolu pardoni al ni kelkajn lingvajn malĝustaĵojn kaj mistajpojn en la 37-a n-ro. Cirkonstancoj ne permesis al ni fari detalan antaŭpresan korekton.

Redakcio.

ESPERANTO EN LERNEJOJ

Redaktas: Oldřich Schwetter, instruisto, Havířov I, blok 14/67.

III-a Internacia Sportkonkurso de Esperantistaj Lernejoj (ISEL). ----- (daŭrigo)

4/ Reprezentantoj: Ĉiun lernejon reprezentos kiu ajn nombro de knaboj aŭ knabinoj naskiĝintaj en la jaroj 1944-45. Ĉiu el ili kuros, saltos kaj ĵetos. Iliaj plej bonaj rezultoj en la kuro, salto kaj ĵeto estu poentataj laŭ viaj propraj reguloj. Laŭ via poentado estos starigita la vico en via skipo (teamo): knaboj kaj knabinoj aparte. Por la fina taksado sendu al mi la rezultojn de viaj kvar plej bonaj knaboj kaj kvar plej bonaj knabinoj. Mi mem poentos ilin laŭ la ĉeĥoslovakaj reguloj. La rezultojn mi diskonigos. Oni vetbatalas pri la plej bonaj skipoj: knaba kaj knabina; ankaŭ pri la plej bona knabo kaj knabino. Lernejo el kiu ajn parto de la mondo povas aligi skipon de knaboj aŭ de knabinoj aŭ ambaŭ.

5/ Efektivigo de la maĉo: Unue vi faru antaŭfinalon de ĉiuj viaj gelernantoj. Tiamaniere vi povos elekti vian lernejan skipon ses- aŭ okmembran. Tiu ĉi via ses- aŭ ok-membra skipo vetbatalos en finalo, kiun vi efektivigu la 1-an de junio 1958 (aŭ ĉirkaŭ tiu ĉi dato) dum la Internacia Tago de Infanoj, sed sendu al mi nur la rezultojn de la kvar plej bonaj, kiel mi jam skribis supre. Skribu iliajn nomojn, naskiĝjaron kaj sekson kaj la atingitajn rezultojn en kuro, longsalto kaj ĵeto, por ke mi povu kiel eble plej frue starigi finan suman rezulton de la sport-konkurso. Notu ankaŭ la nombron de ĉiuj konkursantoj en la antaŭfinalo (ekz.: partoprenis 253 el la tuta lernejo). La plej malfruaj rezultoj alvenu la 30-an de junio 1958. Samtempe sendu priskribon pri efektivigo de la maĉo sur via sportejo kaj foton de via skipo, event. ankaŭ aliajn fotojn. Ne forgesu aldoni respondkuponon, por ke mi povu sendi al vi la suman rezulton de la konkurso kaj fotojn, de niaj skipoj.

Mi esperas, ke via lernejo partoprenos tiun ĉi sport-konkurson, kaj ke ni ĉiuj vere internacie festos la Internacian Tagon de Infanoj, la tagon de la mondpaco, interfratiĝo kaj interkompreno.

Kiu jam aliĝis al la III-a ISEL 1958?

1. Temple Boys' School, ROCHESTER, Kent, Anglio. (knaboj)
2. Pécs-Gyárvárosi áll.ált.isk., PÉCS, Hungario. (knaboj kaj knabinoj)

Kiuj aliaj lernejoj sekvos ilin ?!?!

Gesamideanoj en la tuta mondo, vekigu! Ne pensu, ke la aliĝanta lernejo devas esti vere "esperantista". Tiu ĉi vorto estas tie metita por celoj propagandaj. Kvankam ĝis nun aliĝis lernejoj, kie Esperanto estas instruata, sufiĉas, se en la lernejo estas instruisto-esperantisto, kiu eluzos ĉi eblecon por montri la utilecon de Esperanto al ceteraj gekolegoj kaj al direktoro.

Esperantistoj-neinstruistoj, vi havas bonan pretekston enpenetri lernejon. Se vi bone klarigos

ĉion al la direktoro kaj gimnastik-instruisto, se vi diros al ili kiamaniere ĉio helpas al interfratiĝo, interkompreno kaj precipe al la paco, certe ili ne rifuzos vin. Kaj via plua poresperanta agado en la lernejo dependos jam de vi mem. Do, multon vi povas fari — ĉiuj!

Tio estas la ĉefa celo de ISEL — helpi al tiuj, kiuj intencas enpenetri lernejon kaj vastigi tie Esperanton!

Esperantistaj instruistoj, tiu ĉi rubriko "ESPERANTO EN LERNEJOJ" estas por vi. Legu ĝin, sed ankaŭ kunlaboru kaj sendadu al mi viajn spertojn, viajn proponojn. Ne estu skribavaraj, skribu! Helpu plenumi la unuan taskon de tiu ĉi rubriko: ekscii, kie ĉie en nia respubliko estas Esp-o instruata, en kiuj lernejoj kaj internulejoj.

POŝTKARTON kun bildo de ISET Popelná kaj surskribo "Internacia Somera Esperanto-Tendaro — Ĉeĥoslovakio" eldonis Junularo Ostrava. Prezo: 3 pecoj po 1 K, grupoj 4 pecoj po 1 K. Adr.: Draĥ. Kočvara, Ostrava VIII, Kamenec 251/3

LETERVESPERON la 28.5. okazigos E-Junularo Ostrava. Adreso: Draĥ. Kočvara, Ostrava VIII, Kamenec 251/3, ĈSR. Ĉiu sendaĵo respondota! Represo petata!

La januara TAGIĜO elĉerpita! Pli ol 60 abonantoj ne ricevis ĝin. Represo nebla! Vi povas postuli redonon de 2 Kĉs. — Plua presita numero aperos en majo!

Ni dankas al niaj subtenantoj: Večeřa F., Uh. Brod Kĉs 8,-, Major St. Troubelice 3,- Barochová A., Praha 1,- Sladký J. 3,- Křimský Z., Náchod 3,- Doležal J., Petrovice 8,- Magera, Ostrava 3,- Lička, Ostrava 8,- ZK Slezan, Místek 1,- Bartovský, Č. Krumlov 1,- Kočvara, Ostrava 3,- Urban, H. Heřmanice 8,- Odehnal, Karviná 3,- Minarčík, Čadca 3,- Řehák, Třebíč 3,- Prachar, Žarnovice 10,- Patera, Hořice 8,- Šrefek, Mostek 8,- Spáčil, Opava 8,- Vítek, Mělník 8,- Filip, Chleny 8,- Chytil, Lověšice 5,- Gattamayer, Kroměříž 3,- Mikyska, Lysá n/L 8,- Zemek, Prachovice 3,- Šťastný. Libštát 8,- Pour, Dymokury 8,- Novák, Náchod 13,- Zadražil, Pardubice 8,- Heilenwalder, Prostějov 3,- Kopečný, Jihlava 38,- Janda, Kolín 3,-, Vlk, Praha 13,- Zemek, Rumburk, 8,- Šimánek, Debř 8,- Novák, Praha 8,- Jirečková, Lanškroun 8,- Kajš, Vítkov 3,-

Pluajn subtenantojn ni publikigos en venonta numero.

Ĝis nun pagitaj abonoj de Tagiĝo 508

Dissendata al 750 gesamideanoj

VYDAL: Esperantský odbor Domu osvěty P. Bezruče v Opavě.

ADMINISTRAS: Jar. Kuzník, Opava, Mendlova 21.

ILUSTRIS: K. Škovran, Inĝ. arch. M. Kalný, Ing. arch. J. Werner

TAJPIS: Vl. Curylová.